

Ĉar nek Esperanto, nek iu ekzistanta kabineta projekto de internacia lingvo kongruas kun la planoj de Svadost, li senkonpromise forbalaasilin. Precipe akre li kontraŭbatalas Esperanton, uzante pseŭdoverajn asertojn, kiuj malkovras unu dekonon da vero kaj kaŝas naŭ dekonojn. Sekve de tio ninformita kaj facilcredema leganto de la verko ricevas tute distorditan bildon de Esperanto — movado kaj de Esperanto mem. Tia neobjektiva kaj sekve nescienca prezento de Esperanto flanke de la aŭtoro devigis unu el la tri respondecaj redaktoroj de la verko, nome la Esperanto — akademiano E. Bokarev, fari specialajn rezervojn en la redakta antaŭparolo.

La aŭtoro ne volas kompreni, ke nek lia universala lingvo nek iu helpa lingvo internacia falos desur scienca Olimpo en tute preta formo (ĉiuj butonoj alkudriataj). Tia lingvo formiĝos en procezo de interagado inter la jam ekzistanta interlingvistika praktiko laŭ lingvoscienco.

Malgraŭ tiu ĉi manko, la verko estas tre utila kaj interesa. Ĝi enhavas bone argumentitan tezon, ke universala lingvo estos lingvo racie kaj emocie konstruita. Riĉa historia materialo kaj abunda bibliografio faras la verkon prominenta fenomeno en la sfero de interlingvistiko.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 20. n-ro 2 (1969)

408.9:418

»KIEL APEROS LA ĜENERALA LINGVO?«

(Ekaterina Mihajlova, Sofio, Bulgario)*

La problemoj de la interlingvistiko kaj pli speciale la problemoj pri la neceso de internacia lingvo lastatempe ĉiam pli ofte altiras la atenton de la scienca penso. Kaj tio estas klarigebla. La grandioza evoluo de la internaciaj rilatoj, ĝis kiu venis la nuna epoko, denitive metis la problemojn de la interlingvistiko kaj antaŭ ĉio la problemon pri kreado de internacia lingvo sur antaŭan planon en la interesoj de la monda kultura societo. La funkciado, en la nuna epoko, de jam kreitaj internaciaj lingvoj, unualoke Esperanto, prezentas tiel ĉiaman stimulon por prilargiĝo kaj pliprofundiĝo de tiuj ĉi interesoj. Inter multaj esploroj kaj studoj de problemoj de la interlingvistiko kaj pli speciale de problemoj pri la neceso de internacia lingvo apartan atenton meritas la monografio de la soveta aŭtoro E. Svadost »Kiel aperos la ĝenerala lingvo? (en la rusa lingvo), eldonejo »Scienco«, Moskvo, 1968.

Laŭ la aŭtoro la problemoj pri kreado de internacia lingvo estas »gravega neceso de nia tempo«, kiel estas titolita ankaŭ la unua ĉapitro de la monografio. Hodiaŭ, ĉe la mirinda evoluo de la scienco kaj la tekniko kaj ne pli malgrandaj atingoj en la socia vivo nur »la lin-

*) Scienca kunlaboranto — Instituto pri bulgara lingvo en Bulgara Scienca Akademio.

gva realeco en la mondo restas netuŝita de radikalaj transformoj.« Tio tamen ne povas daŭri plu. »Ne estas dubeble, ke la homoj, konsciintaj siajn tutvenkintajn kreaĵn fortojn, ne rezignos longe pri tiu postrestinta lingva fenomeno, kia estas la multlingveco, pri la manko de ĝenerala lingvo.« La multlingveco ĉiam pli kaj pli transformiĝas en malhelpon de progresiva evoluo de la homaro, en veran plagon de la scienco. Aparte klare manifestiĝas tio en diversaj konferencoj, kongresoj, kie la manko de ĝenerala lingvo en konsiderinda grado malgrandigas efikon kaj utilon de la internacia renkonto. »Vere sovaĝan spektaklon prezentas tiu multo da homoj, kolektiĝintaj por scienca konferenco, vestitaj tute egale, kun samaj manieroj, ampleksantaj ... per siaj pensoj kaj konoj ... identajn sferojn de scienco kaj samtempe absolute ne kapablaj interkomunikiĝi kaj bezonantaj servojn de la tradukisto.« (Djon Bernal, »Mondo sen milito«) »Kun kresko de nombro de la literaturaj lingvoj kreskas preskaŭ en geometria progresio nombro de la sciencaj publikaĵoj, kiuj estas nekomprenablaj kaj nealireblaj por la plejmulto de legantoj en la mondo, interesitaj pri iu aŭ alia literaturo.« Tio kondukas ĝis »nekalkuleblaj intelektualaj perdoj« (Dils) por la homaro. »Kio min rilatas«, diras en sia libro »La internacia lingvo« O. Esperen, »malgraŭ tio ke mi dediĉis konsiderindan parton de mia vivo al la ellerno de diversaj lingvoj, ankaŭ mi estas devigita iufoje lasi neglita libron aŭ alian publikaĵon, kiujn mi dezirus tralegi, sed kiuj estas skribitaj en lingvo, kiun mi nesufiĉe posedas«. Hodiaŭ la posedo de eĉ dudek lingvoj ne sufiĉas por ke estu sekvita la evoluo de la kulturo nur en Eŭropo, diras Meje en sia libro pri la lingvoj de la nuntempa Eŭropo. Kaj la ellerno mem de fremdaj lingvoj estas grandega perdo por la scienca penso, ĉar ĝi deflankigas sciencajn laboristojn de lia rekta scienca laboro kaj devigas lin apartigi konsiderindan parton de sia tempo por ellerno de fremdaj lingvoj.

La dua ĉapitro estas dediĉita al la »Kvarjarcenta historio de la provoj por kreado de helpa internacia lingvo«, kiel estas titolita ankaŭ la ĉapitro mem. Tio estas la lastaj kvar jarcentoj. Provoj por kreo de tia lingvo estas faritaj ankaŭ antaŭe. Konata estas ekzemple la provo de la fama Galen, la patro de la fiziologio kaj farmakologio. Provoj estis farataj ankaŭ en la mezepoko. Sed la vera historio de tiuj ĉi provoj komenciĝas ekde la deksepa jarcento. Al la movado por kreo de ĝenerala lingvo aliĝas la plej eminentaj reprezentantoj de la progresiva penso. La problemo por kreo de ĝenerala, de internacia lingvo okupas la penson de homoj kiel Bekon, Dekart, Paskal. Praktikajn provojn por kreo de tia lingvo faras en la sama jarcento la germano Drekselius, la franco Labe, la skotlandano Urkhart, la angloj Bek, Dalgarno, Uilkins, la granda ĉeĥa filozofo kaj verkisto Komenski kaj la genia angla fizikisto, astronomo kaj matematikisto Njuton.

La dekoka kaj deknaŭa jarcentoj

Ne pli malriĉa je tiaj provoj estas ankaŭ la dekoka jarcento. Unu-aloke devas esti menciita la agado de la granda germana matematikisto, logikisto, juristo, historiisto, geologo kaj filozofo-lingvisto Lajbnic kaj pli speciale lia grandioza ideo pri ordigo de la nocioj, kiu ideo, laŭ Lajbnic, devas esti metita en la fundamenton de racia lingvo. La problemo pri ĝenerala internacia lingvo okupas Volter, Monteskje, Kondiĵak, okupas la francajn enciklopediistojn. La dekoka jarcento abundas je provoj por kreo de ĝenerala, internacia lingvo. La granda fizikisto Amper verkas projekton. Eĉ skribas versaĵon en ĝi. La jarcento finiĝas per la prezentita en 1794. jaro de Delormel en la Nacia konvento de Francio projekto de internacia lingvo, diskutita en la konvento en la tria jaro de la Granda Franca Revolucio.

La deknaŭa jarcento estas jarcento de ankoraŭ pli intensa serĉado de solvo de la problemo pri internacia lingvo. Ankaŭ en tiu ĉi jarcento estas farataj provoj por kreo de apriora lingvo. La originala projekto de muzika lingvo de la franco Jan Fransoa Sudre rekontas la aprobon ne nur flanke de plej diversaj komisionoj de la Pariza akademio de sciencoj, sed ankaŭ fare de la elstaraj reprezentantoj de la jarcento kiel Viktor Igo, Lamartin, Aleksandr Humbolt. Interesan provon por kreo de apriora lingvo faras la franco Letele. Iompostiom tamen komencas trovi grundon la ideo, ke internacia lingvo devas esti aposteriora, devas sekvi leĝojn de la naturaj lingvoj. Internacia lingvo devas esti filozofa laŭ la graamtiko, kaj, kio rilatas la vortaron, ĝi devas sekvi historiajn lingvojn, skribas en la mezo de la jarcento la konata franca filozofo Ŝarl Renuvje. Dum la dua duono de la jarcento la ideo por kreo de ĝenerala lingvo konkeras mensojn ankaŭ de elstaraj filozofoj kaj lingvistoj. Grandan atenton por tiu ĉi problemo apartigas unu el la plej eminentaj anglaj filologoj Maks Mjuler. Li venas ĝis la konkludo, ke »la kreo de artefarita lingvo ne estas io neebla. La artefarita lingvo povas esti multe pli regula, multe pli perfekta kaj multe pli facila por ellerno ol kiu ajn el la naturaj lingvoj de la homaro.« La dua duono de la deknaŭa jarcento estas tempo kiam jam oni alpaŝas al kreo de sistemoj, kiuj trovas larĝan socian agnoskon. La unua en historio projekto por ĝenerala lingvo, trovinta larĝan popularecon kaj agnoskon, estas Volapik de Johan Martin Ŝlajer. La aŭtoro pritraktas detale la historion kaj la esencon de tiu ĉi lingvo. Poste li venas ĝis la plej serioza provo de fino de la deknaŭa jarcento — Esperanto. Apartigante la demandojn pri la estiĝo, esenco kaj disvolviĝo de tiu ĉi lingvo por la sekva ĉapitro de sia monografio la aŭtoro daŭrigas postsekvi la historion de la movado por kreo de internacia lingvo per farataj en

la nuna jarcento provoj, el kiuj multaj estas direktitaj al reformo kaj perfektigo de Esperanto. La komenco de la nuna jarcento estas tempo de viva intereso al problemo pri kreo de internacia lingvo. Tiu ĉi intereso estas apogata de la jam firmiĝinta en la internacia lingva praktiko Esperanto kaj de la kreitaj post ĝi kaj trovintaj ian aplikon internaciaj lingvoj kiel Ido, Okcidental, Interlingva. Al la larĝa internacia movado por kreo de internacia lingvo aliĝas eminentaj sciencistoj lingvistoj kiel Hugo Šuhart, Mišel Breal, Oto Espersen, I. A. Boduen de Kurtene, Luj Kutira, Eduard Sepir, la fondinto de la fizika kemio Vilhelm Ostwald, la matematikisto Leopold Lo, la filozofo Anri Bergson kaj multaj aliaj.

Helpa, baza kaj sola lingvo

La tria ĉapitro de la monografio estas dediĉita al »Esperanto kaj al la teorio de du ĝeneralaj lingvoj — helpa kaj sola.« Post kiam li pritraktas, konsidere al la celoj de la monografio kompare plene, la personecon kaj la mondkoncepton de la kreinto de Esperanto d-ro Zamenhof kaj kritikis la reakciajn kaj utopiajn flankojn de lia mondkoncepto, malgraŭ ke tio ne estas en ia intima ligo kun la centra temo de la monografio, kaj post kiam li pritraktas tre koncize la esencon de Esperanto kaj la historion de la Esperanto movado la aŭtoro eksponas sian hipotezon pri la vojoj de estiĝo de la ĝenerala lingvo. Laŭ la aŭtoro »la tutmonda aŭ ĝenerala, tuthomara lingvo povas esti dua (helpa, flanka) lingvo de ĉiuj popoloj de la mondo, povas esti ilia unua (baza) lingvo kaj fine sola (unu). Konvencie dirite, tiuj ĉi lingvaj komunecoj de la estonta homaro estas komunecoj de unua (komenca), dua (transira) kaj tria (finanta) grado.« Tio estas laŭ la aŭtoro la plej verŝajna vojo por kreo de ĝenerala lingvo, vojo nomita de li hipotezo de maksimuma plilargiĝo de funkcioj de la ĝenerala lingvo, t. e. hipotezo de la transformiĝo de helpa lingvo (unua grado) en bazan lingvon de senklasa socio (dua grado), nedeŝirata de ŝtataj limoj kaj finfine en solan tuthomaran lingvon (tria grado). Tiu ĉi hipotezo tamen ne ekskludas, laŭ la aŭtoro, la eblecon de kreo de ĝenerala lingvo kiel lingvo de apriora tipo.

Ne povas tamen ne elvoki kontraŭdiron la aserto de la aŭtoro, ke »la ekzistado de helpa internacia lingvo, kreita sen la partopreno de popoloj, individue... kaj anticipi ne submetita sub larĝa libera diskuto kaj sub pli granda aŭ malpli granda ĝenerala aprobo, estas utopio.« La aŭtoro mem konstatas, ke iuj internaciaj lingvoj, unualoke Esperanto, ekzistas kaj estas uzataj en la praktiko. Sed Esperanto estas kreita „individue«. Aliflanke, ĉu ĝia ekzistado kaj uzado en la praktiko ne prezentas multe pli efikan „pli grandan aŭ malpli grandan ĝeneralan aprobon“ ol la anticipan, antaŭ la kreo de la lingvo, »larĝan liberan diskuton«?

Laŭ la aŭtoro Esperanto ne povas servi kiel kerno por kreo de la estonta ĝenerala lingvo. Tiu ĉi konkludo tamen ne estas rezulto de detala lingvistika analizo de la lingvo. La kritiko kontraŭ la lingvo kiel precipe »okcidenta« laŭ sia leksiko, kontraŭ la leksika larĝeco de iuj prepozicioj, kontraŭ skemeco de la verbaj tempoj, kiel ankaŭ lige kun belsoneco de la lingvo ne estas konvinkaj. Ne estas nur la leksiko, kie devas esti serĉataj indecoj de iu lingvo. Aliflanke, la aŭtoro ne nur ne pruvas, sed ne provas pravi en kio konsistas la netaŭgeco de la »okcidenta« leksiko. La leksika larĝeco de prepozicioj, kiel ankaŭ de ĉiuj leksikaj elementoj, estas imanenta leĝo de la naturaj lingvoj. La aposteriora artefarita lingvo ne povas ne sekvi ĉi tiun leĝon. La malriĉecon de la verbaj tempoj la aŭtoro ilustras per la manko de diferenco inter la aktuala kaj neaktuala prezenco, malgraŭ ke li mem konfesas, ke multaj naturaj lingvoj, inkluzive la rusa, ne konas ĉi tiun diferencon, sen montri samtempe ĉu la manko de tiu ĉi diferenco malmultigas la esprimeblencojn de tiuj ĉi lingvoj. Kio rilatas la belsonecon de la lingvo, evidente estas, ke la aŭtoro sin bazas sur subjektivaj impresoj, sed ne sur esploro de leĝoj de la lingva besonneco.

Kunfludo de la lingvoj

La kvaran ĉapitron de sia monografio la aŭtoro dediĉas al la »Teorio de apartigo de ĝenerala lingvo el la naciaj.« Post kiam li faras revuon de la pli konataj provoj por akiro de agnosko por la franca, germana kaj precipe por la angla lingvoj kiel ĝenerala lingvo, la aŭtoro konkludas, ke nenia nacia lingvo sendepende de la loko, kiun la lingvo okupas en la tutmonda kulturo, konsidere al multaj malperfektaĵoj, kiajn ĝi kiel nacia lingvo havas, ne posedas kvalitojn, kiujn devas posedi ĝenerala lingvo. Sed ne temas nur pri la kvalitoj de naciaj lingvoj, daŭrigas la aŭtoro, sed pri io multe pli grava, pri la nacia egalrajteco. La aŭtoro rememorigas ia formulitan de Lenin principon en la artikolo »La laborista klaso kaj la nacia demando.«: »Nenia privilegio por kiu ajn nacio, por kiu ajn lingvo«, kategorie substrekita de li ankaŭ en »Kritikaj rimarkoj pri la nacia problemo«: »senkondiĉe nenia privilegio por kiu ajn nacio, por kiu ajn lingvo«. Finfine, konkludas la aŭtoro apoge de la ideo, ke nenia nacia lingvo povas esti elektita por ĝenerala, unu pure praktika konsidero: nenia fremda lingvo povas esti plene esposedita. Prava estas Espersen, diras la aŭtoro, en sia aserto, ke ĉiu nacia lingvo ĉe la uzado fare de fremdlandano tute ne estas la sama lingvo, per kiu pirolas kaj skribas tiuj, por kiuj ĝi estas la gepatra.

En la kvina ĉapitro de la monografio la aŭtoro pritraktas »La teorion pri tutmonda kunfluo de lingvoj«, teorion, kiu, laŭ la aŭtoro, en la medioj de sovetaj lingvistoj kaj sociologoj ĝuas, kompare kun ĉiuj

aliaj, plej grandan influon. La esenco de tiu ĉi teorio estas, laŭ la aŭtoro, pasiva rilato al la problemo de ĝenerala lingvo.

Laŭ la aŭtoro la plej eminenta reprezentanto de tiu ĉi teorio estas Mar. La aŭtoro opinias, ke la fundamenta ideo de la tuta teorio de Mar estas lia ideo pri la unueca lingvo de la estonta unueca — komunisma — homaro. La aŭtoro nomas la teorion de Mar teorio pri la piramida tutmonda lingva evoluo, teorio, laŭ kiu la lingva evoluo fariĝas laŭ la direkto de la ĉiam pli granda integriĝo de lingvoj »kontraŭe al la malnovaj konceptoj de iuj burĝaj lingvistoj, opiniantaj, ke ĝi fariĝas laŭ la direkto de ĉiam pli granda diferencado de lingvoj«. Laŭ la aŭtoro »la merito de Mar kiel interlingvisto konsiderinde malgrandiĝas tamen pro tio, ke li ne argumentas tiun ĉi ideon laŭ koncerna maniero, entute ne esploras la naskitan de ĝi kompleksan multaspektan problemon. Io pli malbona: li mem nebuligas ĝin tiel, ke eĉ liaj plej intimaj kunlaborantoj ne povis orientiĝi kaj apartigi en ĝi »herbaĉojn disde la tritiko...«. Laŭ la aŭtoro Mar manifestis »mirindan malkonsekvencecon« konekse kun problemo pri la estiĝo de ĝenerala lingvo. Unupante Mar asertas, ke »lingvo ekde la primara multformeco per gigantaj paŝoj moviĝas al unueca monda lingvo« kaj aliparte subtenas, ke la unueco de lingvo estas »fakto de la fora estonteco« kaj tiam provas konvinki ĉiujn pri la neceso de »artefaritaj rimedoj, science ellaboritaj« por akcelado de tiu ĉi procezo kaj eĉ proponas iujn praktikajn rimedojn ekzemple por kreo de ĝenerala terminologio de la numeraloj. La aŭtoro pritraktas ankaŭ evoluon de la koncepto de Stalin pri la estiĝo de ĝenerala lingvo. Dum en »La nacia problemo kaj la leninismo« Stalin parolas pri estiĝo en la dua periodo de la tutmonda diktaturo de la proletaro de »io kiel ĝenerala lingvo« kun ebleco de ekzistado apud ĝi ankaŭ de naciaj lingvoj, poste li precizigas tiun ĉi sian koncepton per sia starpunkto pri la anticipa estiĝo de zonaj lingvoj. Haltinte plue ĉe kelkaj aliaj konceptoj pri la spontanea estiĝo de ĝenerala lingvo el naciaj lingvoj — la konceptoj de la sovzaj lingvistoj Ĉikobava Ŝaradetenidze, Gadoev, Agajn — la ŭtoro kategorie forĵetas ĉi tiun teorion.

Laŭ la aŭtoro la estiĝo de la teorio de spontanea tutmonda kunfluado de lingvoj povas esti klarigita altgrade per evidenta fakto de kompare facila leksika penetro de iu lingvo en alian. Sed fakte tio estas iluzio. Hodiaŭ laŭ kalkulo de sciencistoj en la ĉefaj eŭropaj lingvoj estas amasiĝintaj ĉirkaŭ 7000 komunaj radikoj, precipe el greklatina deveno. Tiu ĉi fakto tamen per si mem ne proksimigis la popolojn, parolantajn per tiuj ĉi lingvoj, eĉ per unu paŝo al solvo de problemo de la kreo eĉ de nur komuneŭropa aŭ eŭropamerika lingvo. La karela lingvo, pli ol la duono de la vortara konsisto de kiu estas el rusaj pruntoj, daŭras esti karela, sed ne rusa lingvo. La malnovaj turkaj kaj persaj lingvoj, inkludintaj ĝis 80% arabajn vortojn ne perdis siajn strukturajn

karakterizaĵojn. Due la teorio de spontanea kunfluado de naciaj lingvoj ne konsideras la mirindan stabilecon kaj rezistecon de lingvoj. La aŭtoro substrekas la penson de la danlanda acencisto Rask, ke nur la plena ekstermo de iu popolo povas venigi la malaperon de ĝia lingvo. Kaj la stabileco de la lingvoj, laŭ la aŭtoro, estonte ne nur ne malgrandiĝos, sed ĉiam pli kaj pli kreskados paralele kun la transformo de la lingvoj en formon de nacia kulturo, de anta literaturo.

Gradoj de artefariteco

En ĉapitro sesa »Senbazeco de antaŭjuĝoj kontraŭ artefarita ĝenerala lingvo« la aŭtoro kun granda konvinko elmontras, ke »kontestoj kontraŭ la ideo de konscia kreado de ĝenerala lingvo kiel artefarita lingvo, kiujn ne malofte ĉiam ankoraŭ oni povas aŭdi tra legi, estas ŝuldataj aŭ al neinformiteco pri tiu ĉi sfero de konoj aŭ al miskompreno«. Pritraktante la demandon pri artefariteco kaj natureco en lingvo la aŭtoro venas ĝis konkludo, ke ne ekzistas naturaj lingvoj. Li citas la penson de Mar, ke »naturaj lingvoj ne ekzistas en la mondo, ĉiuj estas kreitaj de la homaro«, kaj la penson de la amerika lingvisto Sepir, ke »la termino artefarita havas nek psikologian, nek historian pravigon rilate al tiuj konstruitaj lingvoj, kiuj estas uzataj en la praktiko. Ili estas ne pli artefaritaj ol la tekniko de opera kantisto, kiu (la tekniko) estas artefarita kompare kun la senkonscia tekniko de popola kantisto.« Poste la aŭtoro ordigas ĉiujn lingvojn laŭ la grado de ilia artefariteco je kvar grupoj: 1) lingvoj de la unua grupo de artefariteco estas lingvoj sen literateco, 2) en la duan grupon eniras la literaturaj lingvoj, 3) en la tria grupo estas la projektoj por aposterioraj internaciaj lingvoj, respektive jam kreitaj aposterioraj internaciaj lingvoj kaj 4) la projektoj por aprioraj internaciaj lingvoj. La aŭtoro aldonas, ke »la cibernetikaj lingvoj, la matematikaj lingvoj — kodoj, kaj en plej simpla speco ĉiuj kodoj... povas esti nomitaj lingvoj de kvina grado de artefariteco, sed tie ĉi la vorto lingvo estaz uzata en alia, ne en la ordinara senco«. »La lingvoj de la unua kaj dua gradoj de artefariteco estis kreataj iompostiom de gentoj, triboj, popoloj en fluo de la tuta socia historio. La lingvoj de la tria kaj kvara gradoj de artefariteco estis kreataj en mallongaj templimoj de unu homo aŭ grupo da homoj per materialo de historiaj lingvoj aŭ aparte de ili — kiel projektoj de internaciaj lingvoj, plej ofte kiel mortenaskitaj lingvoj kaj nur malmultaj inter ili plenumis (Volapik) aŭ plenumas la funkciojn de internacia lingvo (Esperanto kaj en multe pli malgranda grado iuj aliaj). Nur la lingvoj de la unua grado povas esti nomitaj kun rezervo naturaj (pli ĝuste oni povas diri kvazaŭnaturaj) uzante ĉi tiun terminon figure, kiel sinonimon de la adjektivoj historiaj, evoluciaj, en senco de spontanee kreitaj«.

Por pliatigo de la grado de artifariteco de la lingvo ĝis grado de scienca sintezo de lingvoj de la tuta homaro ekzistas, laŭ la aŭtoro, neniam malhelpo. »Se la naciaj lingvoj konsistas pli aŭ malpli de la duono de pruntaĵoj, pro kio ne povas konsisti tute el pruntaĵoj la tutmonda internacia lingvo?!« Finante ĉi tiun ĉapitron de sia monografio la aŭtoro proponas sep kriteriojn por elekto de vortoj por vortaro de la ĝenerala lingvo: nombro de la popolo, disvastiĝo de la lingvo ekster la teritorio de la popolo, disvastiĝo de la vortoj de iu lingvo en aliaj lingvoj, la taŭgeco de la lingvo, konstatita per kompare kritika metodo de la lingvistika analizo, la kontribuo de la popolo al la evoluo de la monda civilizacio, ĝia kontribuo al la monda revolucio por liberigo kaj unuigo de la laborula homaro kaj finfine etnikaj kaj regionaj konsideroj.

La teorioj ĝismun kaj la teorio de Svadost

La konkludan, sepan ĉapitron, titolitan »Tutoma lingvo kiel unu el la problemoj por la transformado de la mondo« la aŭtoro komencas per grupigo de pritraktilkaj de li teorioj pri la ĝenerala lingvo, kiuj laŭ la aŭtoro estas kvar: 1) teorio pri helpa lingvo, 2) teorio pri du ĝeneralaj lingvoj, helpa kaj sola, 3) teorio pri apartigo de ĝenerala lingvo el la naciaj kaj 4) teorio pri la tutmonda kunfluo de lingvoj. Ĉiu el tiuj ĉi teorioj havas, laŭ la aŭtoro, siajn variantojn. La unua havas du ĉefajn variantojn: teorion pri apriora lingvo kaj teorion pri aposteriora lingvo. La baza varianto de la sinsekvaj du ĝeneralaj lingvoj estas la transformado de Esperanto en helpan lingvon kaj prokrasto de la solvo de problemo pri la unueca lingvo ĝis la monda venko de socialismo. La baza varianto de la tria teorio estas la transformado de la angla lingvo en ĝeneralan lingvon. La ĉefaj variantoj de la kvara teorio estas la tutmonda kunfluo de la etnikaj lingvoj antefarite plirapidigita kaj la tutmonda spontanea kunfluo de ĉiuj naciaj lingvoj en kondiĉoj de la tutmonda socialismo.

Al tiuj ĉi teorioj la aŭtoro kontraŭstarigas sian teorion — kvinan — teorion de la scienca sintezo de lingvoj de la homaro, por la kreado por kiu la aŭtoro proponas en la fino de la sesa ĉapitro, kiel ni jam vidis, sep kriteriojn. Laŭ la aŭtoro, lia teorio ne estas plena neo de la antaŭaj. Ĝi prenas el ili ĉion pozitivan. El la unuaj du ĝi prenas la agnoskon de la ebleco kaj neceso de konscia celdirektita kreado de lingvo por internacia komunikado, el la teorio pri apartigo de ĝenerala lingvo el la naciaj — la agnoskon de la viva ĝenerala lingvo en ĉiuj ĝiaj funkcioj komencante de la funkcio de ĉiutaga komunikado kaj finiĝante kun la artiliteraturo, el la teorio de la tutmonda kunfluo de lingvoj — la agnoskon, ke la ĝeneraal lingvo devus inkludi elementojn el ĉiuj naciaj kaj eĉ tribaj lingvoj. »Tiuj ideoj por unua fojo en la kvina teorio unuigas kaj evoluas«.

Poste la aŭtoro, atentigante, ke en la antaŭaj ĉapitroj lia teorio fakte estas traktita en teknike ekonomia kaj historie kritika aspekto, transiras al la pritrakto de la teorio el socialpolitika, metodologia, filozofia sociologia, kulturhistoria kaj logiklinvistiika aspekto. »La problemo pri ĝenerala lingvo estas unu el la plej gravaj problemoj de revolucia transformado de la mondo.« Pro tio portanto de la ideo pri ĝenerala lingvo, substrekas la aŭtoro, devas estiĝi ĉiuj progresivaj fortoj. Ĉi tie la aŭtoro citas la vortojn de Anri Barbis: »Se la homaro volas liberiĝi el la jarcentaj katenoj kaj de ĉiuj antaŭjuĝoj, ankoraŭ pli malbonaj ol tiuj, kiuj ĝis nun ĝin tenis en subeco, necese estas antaŭ ĉio ke ia homoj interkompreniĝu kaj por interkompreiĝi necese estas paroli per unueca lingvo.« Kaj Anri Barbis aldonas: »Ĉiuj kontraŭdiroj, skribitaj kontraŭ la ideo de helpa lingvo, havas nenian valoron. Ili eliras aŭ de homoj kun mallarĝa horizonto, kiuj konfuziĝas de tiu granda ideo kaj kiuj nenion komprenas rilate al la progreso, aŭ de ŝovinistoj — homoj ankarou pli limigitaj, kiuj neallasas, ke la mondo ne akceptus ilajn lingvojn...«

La uzado de ĝenerala lingvo, daŭrigas la aŭtoro, ne signifas, kiel iuj timas, perdon de la individuaj trajtoj de la popolo kaj de la apartaj homoj. La ĝenerala lingvo ne nivelas, tiel kiel ankaŭ la naciaj lingvoj ne nivelas. Ĉu la antagonistaj klasoj en la nacia socio ne uzas la saman lingvon? »Multajn maltrankviligas la perspektivo de perdo en la fora estonteco de la lingva originaleco de la verkoj de la grandaj majstroj de la parolo... Kio fariĝos kun la versaĵoj de Puŝkin kaj Gete, kun la romanoj de Igo kaj Zola, kun la tragedioj de Ŝekspir kaj tiel plu? Sed strange: neniu maltrankviligas la cirkonstanco, ke Puŝkin por la grandega plimulto de ŝatantoj de la poezio estas alirebla nur en traduko, kiel ankaŭ Gete, Igo, Zola, Ŝekspir, kiel ankaŭ ĉiuj kreintoj de la naciaj literaturoj. Neniu maltrankviligas la cirkonstanco, ke la plejmulto de la naciaj literaturoj estas alirebla en originalo nur al sensignifa procento de ĉiuj legantoj de artaj verkoj en la mondo, ofte — nur al parto de unu procento. Neniu maltrankviligas tio, ke la latina lingvo, en kiu estas kreitaj senmortaj majstroverkoj de la poezio kaj de la prozo, delonge estas morta, ne havanta popolon-portanton... Kaj la malnovgreka kun siaj »Iliado« kaj »Odiseo«? Kaj la sanskrita lingvo kun siaj »Vedoj«. Kaj la antikva ĉina? Kaj la klasika araba? Kaj la antikva persa? ..En la procezo de la lingva evoluo de homaro tiaj perdoj estus neeviteblaj ankaŭ en la estonteco.«

Kaj finfine?

Sian monografion la aŭtoro finas per la vortoj: »Sciate estas, ke kontraŭ ĉiu nova ideo, kontraŭ ĉiu nova iniciato povas esti farataj ia aŭ alia kontraŭdiro. Sed ĉu kuraĝos iu asreti, ke komprenebla por ĉiuj

kaj ĝenerala por ĉiuj lingvo entute ne estas necesa, nek hodiaŭ, nek morgaŭ, nek en la estonteco? Povas esti kontestata ĉio en la proponita traktado de la problemo pri ĝenerala lingvo, sed apenaŭ oni povus kontesti, ke estas veninta la tempo por teoria prilaboro de ĉiuj ĝiaj aspektoj.»

La aŭtoro estas tute prava, kiam li diras, ke estas neeble aserti hodiaŭ, ke la homaro ne bezonas kompreneblan por ĉiuj kaj ĝeneralan por ĉiuj lingvon. Ne povas esti kontestate, ke estas veninta la tempo por teoria prilaboro de ĉiuj ĝiaj aspektoj. Do, tia prilaboro, valora kontribuo al kiu estas ankaŭ la pritraktita verko, estas jam delonge komenciĝinta. Kio estas vidata de la grandega literaturo, montrita kaj uzita de la aŭtoro kaj en kiu rilato la libro de E. Svadost prezentas veran enciklopedion pri ĉio, kio estas skribite pri la demando rilate al la kreo de ĝenerala lingvo. Malkontentecan tamen elvokas nur la negativa rilato de la aŭtoro al Esperanto. Nenio povas tiel sukcese helpi al la teoria prilaboro de la problemo pri la ĝenerala lingvo kiel ĝia kontrolo per la uzado de la jam ekzistanta en la lingva praktiko internacia lingvo.

La pritraktita verko estas tre interesa literatura fakto. La aŭtoro ne estas esperantisto. Io pli. Li estas kontraŭulo de Esperanto. Sed lia verko povas esti rigardata kiel tre valora kontribuo al la por-Esperanta literaturo, ĉar la verko defendas kun konkvinca forto multajn de la principoj, sur kiuj estas bazita Esperanto. La negativa rilato de la aŭtoro al Esperanto estas evidente ŝuldata al la manko de profundigita lingvistika analizo de Esperanto, pri kio atentigas ankaŭ la reduktoro de la libro profesoro doktoro E. Bokarev.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 20. n-ro 2 (1969)

683.98 : 662.593

ELEKTRAJ FAJRILOJ POR PIPOJ KAJ CIGAREDOJ

(K. J. Young, Anglujo)

Jam delonge konata estas la cigared-fajrilo kiu uzas benzinon aŭ butanon. De eĉ pli longe konata estas la silik-ŝtala mekanismo kiu lanĉas fajron al la meĉo aŭ gas-blovo. Tamen en publikaj konstruaĵoj, kie multaj personoj uzas ilin, tiaj fajriloj rapide difektiĝas kaj ili bezonas oftan prizorgon. Krome la ĉiujara kosto de brulaĵo, meĉo kaj siliko ne estas bagatela.

Oni ŝajne ĝis nun neglektis la eblecon konstrui elektrajn fajrilojn. Tiaj ekzistas por aŭtoj, kie oni uzas la 12-voltan baterion kiel fonton de energio, sed kelkaj uzantoj plendas pri blokado de la elemento per cindro.

Tamen tiu malavantaĝo eble fontas el la fakto, ke 12-volta tensio ne estas la plej taŭga; oni verŝajne elektis ĝin en aŭtoj por eviti la bezonon de aparta cirkvito. Oni povus fabriki neporteblan elektran fajrilon por fiksado al muro per la nura kombino de aŭto-tipa fajrilo kun transformilo plus ŝaltbutono kaj fandogurdilo en la primara cirkvito. Tamen eksperimentoj kun iom da nikelkroma drato de 25 s. w. g. (0,51 mm diametro) prenita el 1 kŬ-a elektra hejttilo montras, ke tia drato estas sufiĉe fortika kaj muntebla sur porcelanan klemtenilon (veldado estas neoportuna).

Por plej granda ekonomio de energi-konsumo, elemento 1 cm. longa sufiĉas, ĝi ne estas tro granda por la faŭko de ordinara pipo, eĉ se tiu ne estas plenŝtopita de tabako. La dratpeco, kiun oni detranĉas, estas iom pli longa pro la finaj-pecoj, kiujn oni plej oportune faldu dufoje por malpligi la reziston de la parto kiu servas nur por konekto. Kompreneble ĉiuj konektoj en la sekundara cirkvito havu kiom eble plej malgrandan reziston.